nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2022

## KOMENCIĜAS LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Tiu ĉi numero de Nia Voĉo venas iom antaŭe ol kutime, por rememorigi la tujan komencon de la la 80a Hispana Kongreso, kiun pluraj madridaj esperantistoj partoprenos, kaj por inviti tiujn ankoraŭ ne decidintajn veni, ĉar ankoraŭ restas tempo se vi rapidas.

La renkonto komenciĝos vendredon la 29an de aprilo, per ekskurso al la groto El Soplao, kaj bonveniga festo en kiu ĉiu partoprenanto povas kunporti specialaĵon de sia regiono por kunmanĝi kaj kuntrinki. La programon de la sekvaj tagoj vi povas konsulti en la retadreso: https://www.esperanto.es/hef/index.php/80a-kongreso/programo. Ĝi plenos el kulturaj kaj distraj programeroj, kun muziko, teatro, konferencoj, filmoj, turismaj vizitoj kaj multe pli. La lasta tago estos la 3a de majo, kiam oni povos ĝui viziton al la historiaj urboj Santander kaj Santillana del Mar.

Vi ankoraŭ povas akompani nin. Jam 150 plenigis la aliĝilon. Vi povas fari la samon ĉe la adreso http://www.esperanto.es/kantea/eo/aligilo/ aŭ vi ankoraŭ povas aliĝi surloke (kvankam ni sugestas ke almenaŭ oni anoncu sin antaŭe, ĉe kongreso@esperanto.es). Se vi bezonas helpon pri praktikaĵoj (transporto, loĝado, ktp) skribu al sama adreso aŭ legu la informojn ĉe: http://esperanto.es/kongreso/.

## PUBLIKAJ AKTIVAĴOJ EN APRILO

Kiel ni informis pasintmonate, antaŭ kelkaj tagoj ni havis la okazon montri Esperanton en la publika sfero.

La 21an de aprilo du esperantistoj partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, tradicie organizata de la Círculo de Bellas Artes, finfine denove ĉeeste. Laura Higuera kaj Albert Stalin Garrido legis po pecon de la verko en la esperanta traduko. Vi povas spekti ilian legadon en la tŭitera konto de Liceo, respektive en jenaj adresoj: Laura ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida/status/1518342571050868738 kaj Albert ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida/status/1518342086881390592.







La 22an de aprilo estis festata la Nokto de la Libroj, kunvokita de la madrida regiona registaro. En la sidejo de MEL estis prezentata la libro "Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España 1890-1936", fare de ĝia aŭtoro, Roberto Garvía Soto, profesoro de Sociologio de la Universitato Carlos III. La evento estis prezentita de Félix Jiménez, prezidanto de Liceo, kaj de Ana Manero. Ĉeestis deko da homoj, kaj post la prezento okazis vigla kolokvo, kun diskutado pri la madrida movado en la 70aj-80aj de la pasinta jarcento.

## LEGOKLUBO DE FUENLABRADA ESPERANTO-LIGO

La pasintan 7an de aprilo, je la 18a horo, la esperanta klubo de Fuenlabrada (FEL) okazigis la unuan sesion de nova iniciato: legoklubo.

Ĝi estas gvidata de nia samideano Laura Higuera, mem verkistino. La unua teksto komentita estis la rakonto "Miaj prizonoj – Mia granda ŝanco", de Adem Demaçi, albano de urbo Pristina, en Kosovo. Temas pri rakonto kun versioj en 34 lingvoj, tradukitaj plejparte utiligante kiel ponton la lingvon Esperanton. En tiu ĉi okazo partoprenis la tradukisto de la rakonto en hispana lingvo, Manolo Parra.

La iniciaton oni ripetos ĉiujn monatojn. Oni proponas tekston antaŭe, kaj oni komentas ĝin kune. Vidu la priskribon kaj la proponon en la retadreso de FEL: http://www.esperanto.es/fel/?page_id=6124 aŭ kontaktu kun la respondeculoj ĉe: esperantoesdetodos@gmail.com. La loko estas la sidejo de la asocio, en la CEPA Paulo Freire, strato Creta 2 de Fuenlabrada, apud stacio Fuenlabrada Central.

Jen la prezento fare de Laura: «Estas por mi plezuro prezenti la unuan sesion de la Legoklubo "Fuenlabrada Esperanto-Ligo". Mi pensas, ke legado en lingvo, kiun neniu trudis al ni, estas unu el la plej altaj niveloj de libereco. Legado estas necesa kaj bela elemento por pliboniĝi en la lernado de iu ajn lingvo. Oni ne nur havas la eblecon akiri novan vortprovizon danke al ĝi, sed ankaŭ disvolvas pli kritikan pensadon pri ĉio, kio ĉirkaŭas nin. Hodiaŭ, tiu kritika kapablo ŝajnas eĉ pli ol iam necesa: la "realo" montras al ni en siaj sennombraj versioj kaj kun siaj senlimaj nuancoj, kun datumoj foje tro maĉitaj, manipulitaj kaj dolĉigitaj por nutri morbon. Engluti tiujn ĉi datumojn sen plua analizo, kondamnus nian penson al danĝeraj niveloj tipaj de plata elektroencefalogramo. Pro tio, lasi aliajn elekti por ni kiel pensi estas, por diri almenaŭ, riskega pafo. Jen la kialo, kial mi konsentas kun Vargas Llosa: lerni legi estas la plej grava afero, kiu okazis al mi en mia vivo.»

## AŬDKURSO DE FEL

FEL ankaŭ pretigis alian iniciaton: aŭdkurson de Esperanto. La celo estas lerni la lingvon kaj perfektigi la parolan konon. Pro tio oni elektis la verkon «Gerda malaperis!» de Claude Piron, kiu prezentas rakonton kies lingvonivelo iom post iom kreskas laŭ la historio. Vi povas konsulti kaj aŭskulti en la adreso: http://www.esperanto.es/fel/?page_id=5568.

## MADRIDAJ KUNVENOJ

La unuasabata rendevuo okazos la 7an de majo je la 18,30 horo, denove en la strato Esperanto de Madrido, en la polpejo Pulpería O Miño, ĉe numero 2 (metrostacio Alsacia, lineo 2). Ni kuntrinkos kaj kunbabilos, kaj la partopreno estas tute libera, kiel ĉiam.

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sed sen aparta programo.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com